



PHOTO-ELECTRO-RECORD

**Produktaĵo de
scienca esplorado kaj plej
nova tekniko**



**La ideala sonografia disko
por arto kaj dancado**

FRW32

PROLOGO

de

OTTO FLATAUER

verkita por la

19a Universala Kongreso de Esperanto en Danzig (28. 7.—4. 8. 1927)

parolita de EDITH HERRNSTADT-OETTINGEN

*Kvardek jarojn nun jam flirtas la standardo
Kun kvinpinta helbrilanta verda stelo!
Kvardek longajn jarojn koro kaj rigardo
Sopiregas altan al standarda celo!
Kvardek longajn jarojn en anima ardo
Ni esperas al de l' mondo bono, belo!
El Standardo nia fluu la instigo:
Jen antaŭen rekte: fratoj en Dancigo!*

*Kvardek — nombro sanktigita per Biblio!
Kiam plenumiĝas de l' homaro sorto
Okazaĵoj grandiozaj: Diluvio!
La revelacio de la vorto Deko!
La dezertmigrado! — Kiam gvidis Dio
Alten la homaron per majesta forto —
Ĉiam staras kvardek ĉe la mondakcelo.
Kaj nun staras kvardek ĉe la verda stelo! —*

*Fratoj ĉe la kvardekjara jubileo:
Ĉu la homan perfortecon pereigis
La terura diluvia hompereco?
Ĉu homaron al homeco jam instigis
Eĉ de l' sankta Deka vorto altideo?
Ĉu sin post dezertmigrado interligis
La homaro — per fratiga pacrubando —
Veni al la sole vera „Sankta Lando?“*

*Tra la multmiljaroj bruas hombatelo
Pro terpeco! supereco, venkogloro!
Tamen daŭre celis al la idealo —
De l' malmultaj, sed plej bonaj — homa koro
„Homoj estu homaj!“ Iĝis la signalo!
„Interkomprenigo!“ For militfuroro!
Marŝu al la sole inda homa farno:
Man-en-mane nur laboru la homaro!*

*Antaŭ kvardek jaroj tiu ĉi alveko
Ree tra la disigita mondo sonis,
Sed antaŭe en neniu tempekoko
Iu la signalon tiel forte donis;
Ĉar neniam — ankau en neniu loko —
Mondhelplingeo bela la alvokon kronis!
Dankon, kara Majstro, pro la glora farno,
El animo plena dankas la anaro! —*

*Kvardek jarojn nun jam flirtas la standardo
Kun kvinpinta helbrilanta verda stelo!
Kvardek longajn jarojn koro kaj rigardo
Sopiregas alten al standarda celo!
Kvardek longajn jarojn en anima ardo
Ni esperas al de l' mondo bono, belo!
Alten la standardon nun, Danciga rondo:
Esperanto marŝas: Nia do la mondo!*

Tre estimata aŭskultantaro!

Permesu al mi kelkajn klarigojn pri ĉi tiu nova sonografia disko de la firmo „Tri-Ergon-Musik, Berlin“.

Temas ĉi tie pri nova sistemo de gravuriĝo de sonografiaj diskoj, farata laŭ la procedo de la „Parolanta Filmo“, inventaĵo de tri germanaj inĝenieroj: Joseph Massolle, Hans Vogt kaj Dro Jo Engl, kaj nomata „Tri Ergon“ — „La Verko de la Trio“.

Same kiel la bildo, ankaŭ la sono estas fotografe fiksata sur film-bendo, nur kun la diferenco, ke la malfortaj energioj de la sonor-ondoj unue estas transformataj en elektrajn impulsojn, kiel ĉe la Radio, kaj nur poste en lumon, por influi la nur por lumo impreseblan bromargentan tavolon de la film-bendo. Ĉi tiu poste estas rivelata kaj ankaŭ kopiata laŭ la kutima fotografa procedo. Ĉe la reproduktado de la sono la ĵus priskribita manipulado estas ripetata en kontraŭa direkto: la varioj de nigriĝo estas transformataj en lumon, ĉi tiu en elektron kaj ĉi tiu en sonojn. Do la samaj sonoj, kiujn la homa orelo aŭdis ĉe la originala prezentado — indiferece, ĉu ili estas muziko, parolo aŭ bruo — estas kvazaŭ sorĉe reaperigitaj.

Ĉar ĉi tiu procedo estas tute seninercia, do ne havas mekanismon kun vibracioj de maso, estas garantioble por sonfiksado absolute fidinda ĝis ĉiuj detaloj. Ĉiuj fortovarioj de la tono en parolo kaj muziko, de proksimume 50 ĝis 10000 dum sekundo, ĉu ĉe fundamentaj tonoj, ĉu ĉe ties super- kaj subtonoj, povas esti fiksataj absolute proporcie. Per tio estas atingata la nuntempe plej alta grado de laŭ-natura reprodukto de parolado, kantado aŭ muziko; la tono estas reproduktata en sia tuta originaleco. Kion ĝis nun la mekanismo — ĝi estu eĉ bonege pripensita kaj tre delikate konstruita — ne kapablis fari en ĉi tiu rilato, tion la sonfiksado sur filmo solvas facilege.

La superoj de ĉi tiu son-film-bendo kondukis ankaŭ sur novajn vojojn en la fabrikado de sonografiaj diskoj, kia estas klare demonstrata per ĉi tiu disko: „Tri-Ergon, Photo-Electro-Record“.

Ĉe ĉiuj aliaj procedoj ĝisnunaj la sonskribado sur la matricon devas okazi dum la sama tempodaŭro kiel la postareprodukto — do kun proksimume 80 turniĝoj dum minuto. Tio evidentigas, ke la multnombraj delikataj tonvibroj grandparte perdiĝas kaj ke facile estiĝas malprecizigoj kaj malklarigoj de la tonoj. Kontraste al tio oni povas apliki ĉe Tri-Ergon kvazaŭan sistemon de fotografado per malrapidiga lupeo. La film-bendo estas espozata en malrapidigita tempomezuro kaj la disko same malrapide impresata. Ĉe tio laŭplaĉe estas eble, ekzemple muzikaĵojn de kvar minutoj engravuri dum samnombraj horoj. Ke la gravurilo ĉi-tiumaniere laboras pli precize kaj pli fidinde ol en rapideco, estas sufiĉe evidente. La sonaro de piano, plej altaj flaĝolet-tonoj de violono, la tonnuancoj de la homa voĉo estas reproduktataj per la „Tri-Ergon-Sonografi-Disko“ en preskaŭ perfekta pureco kaj beleco, pri kiu vi nun konvinkigas.

Mi ĝojas, ke estis eble al mi, en ĉi tiu maniero konatigi al vi teknikan novaĵon.

(Parolita de Edith Herrnsdorf-Oettingen)

DISKOJ EN ESPERANTO

1. Klarigoj pri la elparolado

" " " " " " " "
parolitaj de *D-ro Edmond Privat*, ano de la
Esperantista Akademio.

2. Parolado de D-ro Edmond Privat parolita de *D-ro Edmond Privat*.

El la parolado de D-ro Zamenhof okaze de la
unua kongreso en Boulogne s. M. 1905
parolita de *Edith Herrnsstadt-Oettingen*.

3. Prologo de Otto Flatau por la XIX-a Kongreso en Danzig

Parolado pri la inventaĵo TRI-ERGON
parolitaj de *Edith Herrnsstadt-Oettingen*.

Ĉiu disko (duflanka)
estas aĉetebla izole kaj kostas kun sendo:

En Germanio:	En ĉiuj aliaj landoj:
RM 6.00	Frk. 8.50 svisa valoro

La tri diskoj kune
RM 15.00 Frk. 22.00 svisa valoro

Mendebla ĉe:

UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO
(Komerca servo)

12 Boulevard du Théâtre, GENÈVE (Svislando).

Bonvolu uzi la aldonitan mendilon.

Por pagoj prefere uzu poŝtĉekon aŭ internacian poŝtmandaton aŭ bankĉekon.

Atentu!

Bone regulu la aparaton, nur tiamaniere estas eble atingi
naturosimilan reproduktadon.

MENDILO

Al Universala Esperanto-Asocio

(Komerca servo)

12 Boulevard du Théâtre
Genève

La subskribinto ano de UEA N-ro..... mendas:

Sumo:

.....diskon N-ro..... po

.....Kolekton de tri diskoj.....

Sumo:

kaj sendas tiun monon samtempe per bankbiletoj — bank-
ĉeko — internacia poŝtmandato — poŝtĉeko — respond-
kuponoj de UEA —

Loko kaj dato: Nomo:

.....Adreso:.....

Poŝtĉekaj kontoj:

Poŝtĉekkonto 79236

Praha

Poŝtĉekkonto

Genève I. 2310

Compte de chèques postaux

Lyon 22176

Poŝtĉekkonto S. H. S.

Zagreb: 40759

Poŝtĉekkonto 90850

Frankfurt am Main

Conti Correnti Postali

Bologna 3-327

Compte de Chèques Postaux

Bruxelles 184200

Postgiro Stockholm

Konto 4138

Poŝtĉekkonto 190576

Warszawa

Poŝta Sparkaso

Wien: konto 105439